# BULTENO
## DE LA INTERNACIA LABOR-OFICEJO

**N-ro 43 (sepa jaro)** **Aŭgusto** **1931**

Aperas ĉiudumonate kiel aldono al « ESPERANTO » Redaktejo: BUREAU INTERNATIONAL DU TRAVAIL, GENEVE

**TEKSTO : La propanoj de la Internacia Laboroficejo pri la senlaboreco. — Novaj ratifoj de la Internaciaj Laborkonvencioj. — La dekkvina kunsido de la Internacia Laborkonferenco, — La Internacia Laboroficejo sendas Komision al Ĉinujo. — La I. L. O. kaj la XXIIIa Kongreso de Esperanto en Krakovo. — PAĜO PRI KOOPERADO. —**

## La proponoj de la Internacia Laboroficejo pri la senlaboreco

La Direktoro de la Internacia Laboroficejo, S-ro Albert Thomas, submetis al la Administra Konsilantaro de la Oficejo diversajn proponojn celante praktikan agadon kontraŭ la senlaboreco en Eŭropo.

La prezentita dokumento pritraktas precipe la eŭropajn flankojn de la tutmonda senlaboreco. Ĝi rememorigas la specialajn laborkondiĉojn de Eŭropo, la kaŭzojn de la krizo kaj la rimedojn, adoptitajn por ĝin kontraŭbatali precipe la senlaborec-asekuro. Sed ĝi insistas ĉefe sur du punktoj : la neceseco organizi la dungigon de laboristoj, kaj la eblecon realigi gravajn publikajn laborojn.

La konvencio pri la senlaboreco alprenita en Washington en 1919 dum la unua Internacia Laborkonferenco jam donas la necesajn bazojn por bona dungigo de la laboristoj. Dudekunu el la Ŝtatoj kiuj ĝin ratifis estas eŭropaj ŝtatoj. La aranĝoj kiujn ili faris en tiu kampo certe jam malpligravigis la krizon. Sed ĉu la progresoj faritaj de la naciaj dungigoficejoj en la diversaj eŭropaj landoj sufiĉas ? La Washington'a konvencio antaŭvidis ke la funkciado de tiuj naciaj oficejoj estos « kunordigata de la Internacia Laboroficejo, en akordo kun la interesataj landoj ». Ĝis nun, tio ne realiĝis. Ĉu ne alvenis la momento realigi tiun ideon, precipe en la eŭropaj landoj ?

Oni povus starigi — ĉu ĉe la Internacia Laboroficejo, ĉu flanke de ĝi, kiel publika negajna institucio — ia « clearing » aŭ centra-oficejo de la demandoj kaj proponoj pri laboro, por ĉiuj profesioj. Tion oni jam faris por la aĉeto kaj vendo de diversaj industriaj produktoj. Kial oni ĝin ne provus por la dungigo de laboristoj kaj por certigi al ĉiuj laboron kaj viveblecon ? Estus speco de eŭropa laborborso. Flanke de sia materiala intereso, tiu institucio prezentus ankaŭ moralan valoron : ĝi alkutimigus la eŭropajn popolojn konsideri la dungigon kiel ne nur nacian, sed ankaŭ internacian aferon.

Oni jam organizis inter kelkaj landoj interŝanĝon de junaj laboristoj (tipografistoj, hotellaboristoj) kun la celo perfektigi iliajn profesiajn kaj lingvajn konojn. En tiuj okazoj la internacia Laboroficejo servis kiel ligilo inter la organizoj kaj la ŝtatoj. La Oficejo ankaŭ faris alian valoran eksperimenton, kun la helpo de pluraj landoj, kiam ĝi sukcesis reklasigi profesie 35.000 rusaj rifuĝintoj, malgraŭ tre malfavoraj cirkonstancoj.

La grundo do jam estas iomete prilaborita hodiaŭ.

Se oni havas necesan volon, oni povus rapide starigi eŭropan laborborson kiu funkcius en harmonio kun la multaj leĝoj celantaj la protekton de la nacia laboro kontraŭ neutila troalveno de fremdaj laboristoj.

En studo kiun ĝi publikigis antaŭ nelonge, la Internacia Laboroficejo montris la intereson, por la ŝtatoj, havi antaŭfiksitan politikon pri la publikaj laboroj kiu povus, se ne malaperigi, almenaŭ malgravigi la senlaborecon, rizervante por la krizperiodoj la realigon de la laboroj kiuj ne bezonas nepre esti faritaj tuj.

Sed flanke de tiu utileco de la naciaj publikaj laboroj kiel parta rimedo kontraŭ la krizo, la Komisio pri senlaboreco, kiu dum januaro 1931, montris « la eblecon, por la registaroj, akordiĝi, kun la helpo de la koncernaj organoj de Ligo de Nacioj, pri la kuna realigo de gravaj internaciaj publikaj laboroj ».

Tiaspecaj laboroj rekte profitus al la landoj kie ili estus faritaj, kaj malrekte, sed ankaŭ forte, al la aliaj landoj pro la plibonigoj kiujn ili alportus, pro la mendoj de iloj kaj materialoj, kaj ankaŭ pro la laborebleco, kiujn ili naskigus. Ili havus plie, psiĥologian kaj moralan utilon : interesigantaj ĉiujn eŭropajn landojn al celoj de eŭropa graveco, ili helpus starigi tiun « eŭropan spiriton » kiun la studa Komisio por Eŭropa Unuiĝo celas enkonduki inter la ŝtatoj.

La Internacia Laboroficejo ne volas nun prezenti fiksan programon, sed nur substreki kelkajn ideojn jam ekstudataj sur tiu kampo.

Estas unue la ideo pri grandaj internaciaj vojoj kiuj korespondus al la ĉiam pli kaj pli grava aŭtomobila trafiko. En la plej progresaj landoj de Eŭropo oni konstruas aŭtomobil-vojojn (« aŭtostratoj ») kiuj ne ankoraŭ estas kunligitaj la unu kun la alia. Tia serio de grandaj vojoj devus havi siajn dorsajn, laŭlongajn kaj laŭlarĝajn ĉefvojojn, ekzemple la dorsajn Parizo-Vieno-Ateno kaj Parizo-Berlino-Varsovio-Moskvo, unu alpa laŭlarĝa vojo, alia iranta de la Balkano al la Baltika Maro. Tiel la celata eŭropa unuiĝo ricevus veran « nervan sistemon ».

Same por la navigeblaj akvoj. Jam ekzistas regionaj retoj. Kial ne kunligi ilin ? Unuigo de la Rejno kaj de la Rono, de la nordgermanaj akvoj kun la Danubo signifus laboroj ĉe internaciaj aŭ plurnaciaj riveregoj kiuj profitus al multaj komercaj landoj de la okcidenta, norda kaj centra Eŭropo.

La Internacia Laboroficejo ankaŭ citas en sia raporto la problemon de la internacia disdonado de elektra energio, jam aludita en skribo de la belga registaro al la studa komisio por eŭropa Unuiĝo.

Ĝi fine aludas al propono kiun ĝi jam plurfoje rekomendis: la anstataŭigo, samtempe kaj unuforme, sur ĉiuj eŭropaj kontinentaj fervojoj, de la nuna vagonkunligsistemo per aŭtomata kunligilo. Tio forigus la multajn gravajn akcidentojn kiuj ankoraŭ ĉiujare okazas kun la hodiaŭa sistemo. Laŭ la kalkuloj faritaj de specialistoj, tia ŝanĝo de la kunligaparatoj sur la fervojvagonoj de Eŭropo donus laboron al pli ol 600.000 laboristoj dum kvin jaroj.

---

La Internacia Laboroficejo substrekas plie ke, en tiu kampo, ĝi nur pritraktis la punktojn kiuj : unue, ne estas ekster la kompetenteco de la Internacia Labororganizo, due, povas esti studataj de la Komisio por Eŭropa Unuiĝo, kaj trie povus esti rapide realigitaj. Ĝi scias bone ke aliaj ekonomiaj aŭ financaj iniciatoj povas havi pli gravan rezultaton por malpliigi la senlaboreco ; sed ĝi aliflanke konstatis la multnombrajn malfacilaĵojn trovitajn dum la tiacelaj traktadoj kiujn oni jam faris dum pluraj jaroj. Kontraŭ senlaboreco oni bezonas tujajn rezultatojn. Rezultatoj povas esti malpli gravaj, sed ili devas esti « palpeblaj ». Estas pro tio ke la Internacia Laboroficejo vole flankenlasis, en sia skribo, aranĝojn pli vastajn eble kaj pli efikajn kun la tempo, kiel tiuj pri kiuj malsame opiniis, en la Administra Konsilantaro, la reprezentantoj de la mastroj kaj de la laboristoj (pligrandigo aŭ malpligrandigo de la salajroj kaj de la labortempo). Tiuj larĝaj problemoj estas tamen regule sekvitaj de la Laboroficejo. Sed en sia raporto al la Eŭropa Komisio la Oficejo nur prezentis precizajn proponojn kiuj interesas pli speciale Eŭropon.

Ĝi proponas al la Komisio :

Unue : studi, kun la helpo de specialistoj (la ĉefoj de la koncernaj administrejoj), la eblecojn tuj plibonigi la internacian dungigon kaj la migradojn de laboristoj en Eŭropo ; due : prepari, por baldaŭa estonto, programon de eŭropaj publikaj laboroj.

# Novaj Ratifoj de la Internaciaj Laborkonvencioj

---

Pluraj novaj ratifoj de internaciaj Laborkonvencioj alvenis al la ĝenerala sekretario de la Ligo de Nacioj dum la lastaj monatoj.

Aŭstralio ratifis la konvencion pri inspekto de elmigrantoj surŝipe, Luksemburgo tiun pri sciigo de la pezo de multpezaj pakaĵoj transportataj surŝipe, kaj tiun pri la protekto kontraŭ akcidentoj, de laboristoj, okupataj pri la ŝarĝado kaj deŝarĝado de ŝipoj. La unuan de tiuj du lastaj konvencioj ankaŭ ratifis Ĉinujo.

Liberio ratifis la konvencion pri deviga aŭ perforta laboro (unu el la lastaj konvencioj starigitaj de la Internacia Laborорганизо, kaj akceptita de la 14-a kunsido, en 1930). Estas la unua fojo kiam Liberio ratifas internacian laborkonvencion. Tiun saman konvencion pri deviga aŭ perforta laboro ankaŭ ratifis Granda Britujo.

Nederlando ratifis la konvencion pri minimuma aĝo por akcepto kiel hejtistoj kaj karbordigistoj surŝipe.

Litovio, kiu ĝis nun ratifis neniun laborkonvencion, ratifis samtempe, dum junio 1931, la kvin sekvantajn konvenciojn:

1. konvencio de Washington pri ok-hora labortago ;
2. » » nokta laboro de virinoj ;
3. » » « infanoj ;
4. konvencio de Genève pri semajna ripozo en industrio ;
5. » » asekuro kontraŭ malsano en industrio.

Francujo ratifis la konvencion, akceptitan en 1925 de la sepa internacia Labora Konferenco, pri kompenso pro profesiaj malsanoj.

Tiu konvencio estas nun ratifita de 20 Ŝtatoj : Aŭstrio, Belgujo, Bulgarujo, Germanujo, Finlando, Francujo, Granda Britujo, Hungarujo, Hindujo, Irlanda Libera Ŝtato, Jugoslavujo, Japanujo, Kubo, Latvujo, Luksemburgo, Nederlando, Norvegujo, Portugalujo, Svedujo kaj Svisujo.

Fine, Pollando ratifis la konvenciojn pri dungokontraktoj de maristoj kaj pri reenpatrujigo de maristoj, akceptita de la Internacia Labora Konferenco de 1926 en Genève.

La unua el tiuj konvencioj devigas la ŝtatojn kiuj ĝin ratifas fiksi en ilia leĝfaro la necesajn formojn kaj garantiojn por la konkludo de dungo-kontraktoj, kun la celo protekti la rajtojn de la maristoj. Dek-tri Ŝtatoj ĝin ratifis ĝis nun.

La dua konvencio certigas al ĉiu maristo elŝipigata dum aŭ ĉe la fino de sia kontrakto la rajtojn esti revenigita ĉu al la dungighaveno, ĉu al la haveno el kiu ekforiris la ŝipo, laŭ la reguligo de la leĝaro. Tiun konvencion ratifis ĝis nun dek-du Ŝtatoj.

Ĉar teknikaj malfacilaĵoj malebligas nin daŭrigi la publikigon de la tabelo pri la progreso pri ratifo de konvencioj, ni donas ĉi-sube kelkajn sciigojn pri la konvencioj kaj la progreso pri ratifoj.

Ĝis nun, la Internacia Laborkonferenco alprenis entute 31 konvenciojn. Jen ilia listo (la titoloj estis mallongitaj ; oni trovos ilin detale en la UEA jarlibro 1931, ĉe paĝoj 24-26) :

*1a* Kunsido de la Konferenco, 1919.

1. Laborhoroj.
2. Senlaboreco.
3. Akuŝo.
4. Nokta laboro, virinoj.
5. Minimuma aĝo (industrio).
6. Nokta laboro, infanoj.
7. Blanka fosforo. (1)

*2a* Kunsido, 1920.

8. Minimuma aĝo (surŝipe).
9. Senlaboreco, kompenspago.
10. Dungigo de maristoj.

*3a* Kunsido, 1921.

11. Minimuma aĝo (agrikulturo).
12. Rajtoj je asociado (agriculturo).
13. Kompenso pro laborakcidentoj (agrikulturo).
14. Plumboblanko.
15. Semajna ripozo (industrio).
16. Minimuma aĝo (hejtistoj kaj karbordigistoj).
17. Kuracista ekzameno de junuloj (laborantaj surŝipe).

*7a* Kunsido, 1925.

18. Kompenso pro laborakcidentoj.
19. Kompenso pro profesiaj malsanoj.
20. Egaleco de traktado (laborakcidentoj).
21. Nokta laboro en bakejoj.

*8a* Kunsido, 1926.

22. Inspekto de elmigrantoj surŝipe.

*9a* Kunsido, 1926.

23. Dungokontraktoj de maristoj.
24. Reenpatrujigo de maristoj.

*10a* Kunsido, 1927.

25. Asekuro kontraŭ malsano (industrio, k.t.p.)
26. Asekuro kontraŭ malsano (agrikulturo).

---

[1] La Berna Konvencio pri Blanka Fosforo konsistigis la temon de unu el la Rekomendoj de Washingston.

11*a* Kunsido, 1928

27 Fiksadmetodoj pri minimumaj salajroj.

12*a* Kunsido, 1929.

28. Sciigo de la pezo de multpezaj pakajoj transportataj surŝipe.

29. Protekto de laboristoj ŝarĝantaj kaj malŝarĝantaj ŝipojn.

13*a* Kunsido, 1930.

30. Deviga aŭ perforta Laboro.

31. Laborhoroj komerco kaj oficejoj.

Ĝis la 18-an de aŭgusto 1931, la tuta nombro de ratifoj oficiale registrataj estis 440. La ŝtatoj kiuj ratifis la plej grandan nombron de konvencioj estas : Luksemburgo (27 konvencioj), Bulgario (25), Irlanda Libera Ŝtato (21), Belgujo (20), Jugoslavio (19), Granda Britujo kaj Estonio (po 18). La konvencio, kiu ĝis nun atingis la plej grandan nombron da ratifoj, estas la Konvencio akceptita de la Sepa kunsido de la Konferenco (1925) pri egaleco de traktado por naciaj kaj fremdaj laboristoj pri kompenso pro laborakcidentoj. Ne malpli ol 27 Ŝtatoj reciproke sin devigis, ke ĉiu el ili faros al la nacianoj de ĉiuj aliaj, se ili fariĝas viktimoj de laborakcidentoj, la saman traktadon pri kompenso, kiel al siaj propraj nacianoj.

Ĝis nun, nenia sciigo estis ricevita de la Internacia Laboroficejo pri aranĝoj faritaj aŭ proponitaj por ratifo aŭ apliko de konvencioj de la jenaj membroj de la Organizaĵo : Dominika Respubliko, Etiopio, Gvatemalo, Haitio, Honduras, Nikaragvo, Panamo, Persujo, Salvador, Siamo, Venezuelo. Ĉiuj aliaj membroj ratifis aŭ faris aranĝojn por ratifi almenaŭ unu konvencion. La meza nombro da ratifoj po konvencio estas nun 14, kompare kun 11 en 1928 kaj 6 en 1924.

## La dekkvina kunsido de la Internacia Laborkonferenco

La dekkvina kunsido de la Internacia Labora Konferenco okazis de la 28*a* de Majo al la 18*a* de junio 1931. Kvardekok Ŝtatoj estis reprezentataj (La Internacia Labororganizo kunigas entute 55 Ŝtatmembrojn). Observantoj ankaŭ ĉeestis de Ŝtatoj ne-membroj, kiel Turkujo kaj Meksiko.

La tagordo de la kunsido enhavis tri ĉefajn demandojn :

1. Minimuma aĝo por allasi gejunulojn al laboro en neindustriaj profesioj.
2. La laborhoroj en la karbominejoj.
3. La revizio de la konvencio pri nokta laboro de virinoj.

La Konferenco unuanime elektis kiel prezidanton S-ron Sokal, iama pola laborministro. Ĝi poste elektis diversajn komitatojn por la studo de la diversaj demandoj en la tagordo, de la ĉiujaraj raportoj de la Ŝtatmembroj pri la aranĝoj faritaj por efektivigi ratifitajn konvenciojn, k.t.p.

Kiel en antaŭaj kunsidoj, la Konferenco dediĉis sufiĉe da tempo al la diskuto de la raporto de la Direktoro, diskuto kiu estas efektive ĝenerala debato pri la politiko de la Organizaĵo.

En sia respondo, kiel en la raporto mem, la Direktoro aludis longe al la grava nuna ekonomia krizo kaj al ĝiaj sociaj konsekvencoj, precipe la senlaboreco. La Konferenco substrekis la necesecon starigi internaciajn rimedagadojn por kontraŭagi la mizeron kiu trafas milojn da laboristoj en la tuta mondo.

Pri la unua demando de la tagordo, la minimuma aĝo por allasi gejunulojn al laboro en neindustriaj profesioj, la Konferenco ne povis jam alpreni konvencion aŭ rekomendon, ĉar temis nur pri antaŭdiskutado de la afero. Sed tiu antaŭdiskutado sufiĉe preparis la grundon, tiel ke oni povas esperi, por la proksima konferenco, alprenon de nova konvencio tiarilata. Tia konvencio kompletigus la Washingtonan Konvencion, kiu temas nur pri infanlaboro en la *industriaj* profesioj.

Pri la nokta laboro de virinoj, temis pri eventualaj ŝanĝoj de la Washingtona Konvencio, ne tuŝante al la principo mem de malpermeso de la virina noktolaboro. La Konferenco aplikis por la unua fojo la proceduron pri revizio de la konvencioj. Ĉe la voĉdono, oni konfirmis la konvencion en ĝia antaŭa formo, kiel postulis la laborista grupo de la Konferenco.

La plej grava decido de la Konferenco certe estis la alpreno de konvencio pri la laborhoroj en la karbominejoj. La nova konvencio fiksas 7 3/4 horan labortagon por la subteraj laboristoj, eniro kaj eliro enkalkulitaj. Por la unua fojo, internacia akordo fiksas labortagon malpli longan ol 8 horoj. Per tiu decido, la Konferenco certe helpos la karboproduktantajn landojn starigi ekonomiajn akordojn inter ili, kaj tiel plibonigi la nunajn kondiĉojn sur la karbo-merkato.

La Konferenco fine decidis peti la Administran Konsilantaron de la Internacia Laboroficejo serĉi la eblecojn praktike apliki la faritajn proponojn por malpliigo de la senlaboreco.

## La Internacia Laboroficejo sendas Komision al Ĉinujo

Laŭ peto de la ĉina registaro, la Internacia Laboroficejo sendis al Ĉinujo specialan Komision, kiu helpos la ĉinan registaron dum la organizo de la laborinspektservo.

Tiu servo estas parto de la nova leĝaro pri la fabrikejoj, kiu antaŭ nelonge estis alprenita de la registaro kaj kiu certe ludos gravan rolon en la socia evoluo de Ĉinujo.

La Komisio konsistas el S-ro C. Pône (franco), sekciestro ĉe la Diplomata Divizio, kaj Sinjorino Adelaide Anderson, iama ĉefinspektorino de fabrikejoj en Granda Britujo. S-ino Anderson longe vivis en ĉinujo kaj akiris profundan konon de la tieaj laborkondiĉoj.

La delegitoj de la Internacia Laboroficejo verŝajne restos en Nankin dum du monatoj.

## La I. L. O. kaj la XXIIIa Internacia Kongreso de Esperanto en Krakovo

La Internacia Laboroficejo estis oficiale reprezentata ĉe la Dudektria Universala Kongreso de Esperanto en Krakovo. Ĝia nova delegito al Kongresoj, S-ro E. S. Hediger, membro de la Oficejo, anstataŭos de nun S-ron C. C. Tarelli en la peresperanta laboro.

S-ro Tarelli, kiu redaktis la esperantan Bultenon de la I.L.O. dum sep jaroj (la unua numero aperis en februaro 1923) forlasis la Oficejon, ĉar li atingis la aĝlimon. La redaktejo de la « Bulteno » ĝojas povi danki lin ĉi-tie por lia longa kaj sindona laboro.

### Duobla jubileo de la kreditkooperativoj por loĝejkonstruado.

Internacia Kongreso de la kredit-kooperativoj por la konstruado de loĝejoj okazis en Philadelphia (U.S.A.) dum Aŭgusto 1931.

La jaro 1931 estas grava datreveno en la historio de tiuj kooperativoj, ĉar estas dum tiu jaro ke la anglaj loĝejaj kooperativoj festos sian centkvindekan naskotagon, kaj la amerikaj kooperativoj sian centan naskotagon.

La unua angla kreditkooperativo por loĝejkonstruado estis starigita la 3-an de Decembro 1781 en Deritend (antaŭurbo de Birmingham). Ĉe la fino de la jaro 1929, ekzistis en Anglujo 1012 tiaj societoj (el kiuj 73 havis kune pli ol duonmilionon anglajn funtojn kiel aktivaĵo) kun entute 1.900.000 membroj. La tuta aktivaĵo de tiuj societoj reprezentis 313 milionojn da funtoj kaj la hipotekaj pruntoj atingis 75 milionojn da funtoj dum la jaro 1923.

La 3-an de Januaro 1931, 37 loĝantoj de Philadelphia starigis la unuan Usonan kreditkooperativon. Hodiaŭ ekzistas en Usono 13.000 tiaj kreditkooperativoj, kun 12 milionoj da membroj, kaj kapitalo de ĉirkaŭ 9 milionoj dolaroj. Ili estas kunigataj en centra asocio, kies sekretario, S-ro H. P. Cellarius, taksas je 8 milionoj la nombron de familiaj loĝejoj por kies konstruo la kooperativaj societoj akordis kreditojn dum ilia centjara ekzisto. Depost 1925, la nombro de la hipotekaj pruntoj neniam estis malsupera al duonmiliono pojare.

### La kooperativa movado en Jugoslavio dum 1930.

Je la 31-a de Decembro 1930, la tuta nombro de jugoslavaj kooperativoj estis, laŭ raporto de la Federacio de kooperativaj unuiĝoj en Jugoslavio, 7077, tio estas 739 pli ol dum 1929.

Tiuj kooperativaj societoj tiamaniere dispartiĝas laŭ iliaj celoj :

| | |
|---|---|
| Kreditkooperativoj | 4.418 |
| Terkulturaj konsumo-kooperativoj | 1.172 |
| Bestbredadaj kooperativoj | 197 |
| Laktoproduktaj kooperativoj | 126 |
| Metiaj kooperativoj | 92 |
| Loĝejaj » | 81 |
| Vinkulturaj | 62 |
| Higienaj | 61 |
| Maŝinaĉetaj | 59 |
| Kooperativoj por elektrigado | 47 |
| Kooperativoj de fiŝistoj | 38 |
| Tritikproduktistaj kooperativoj | 28 |
| Oleo- « « | 19 |
| Agrikulturaj komunumoj | 503 |
| Diversaj kooperativoj | 126 |
| | 7.029 |
| plie : Reviziaj kooperativoj | 30 |
| Lokaj unuiĝoj de kooperativoj | 18 |
| Kune | 7.077 |

kooperativaj organizaĵoj.

### Starigo de kooperativa muzeo en Granda Britujo.

La brita kooperativa Unio akiris la domon kie troviĝis la unua magazeno de la kooperativa societo de la « Equitable Pioneers » en Rochdale. Ĝi starigos en tiu historia domo muzeon pri la kooperativa movado.

### La kooperativa Movado en Svedujo dum 1930.

La Sveda Kooperativa Unio kunigas nun 840 kooperativajn societojn. La nombro de iliaj magazenoj estas 3.302, tio estas 222 pli ol la antaŭa jaro, kaj la nombro de la membroj 450.908, kontraŭ 214.618 en 1929. La vendoj atingis entute 344 milionojn da kronoj (332 milionoj dum 1929).

La rezultatoj de la kooperativaj asekuraj societoj estis bonaj. La kooperativa Asekura Societo « Samarbete » asekuris dum 1930 kapitalojn atingantajn 1,4 miliono da Kr., kontraŭ 1,3 miliono en 1929 ; la kooperativa societo por la vivasekuroj « Folket » asekuris por 194, 6 milionoj da Kr., ĉe la fino de la jaro 1930.

Fine, la kooperativa fabrikejo de elektraj lampoj komencis liveri sian produkton (Lampoj LUMA) al la kooperativoj dum la jaro. La unuiĝitaj aliaj fabrikoj devis tuj malaltigi sian prezon de 1,35 al 0,95 krono po lampo. Oni jam komencis traktadojn por la internaciigo de la kooperativa fabriko de elektraj lampoj, por kontraŭbatali la privatan monopolon en tiu kampo.

### La kooperativaj societoj en Japanujo.

La Centra Unio de japanaj kooperativaj societoj *(Sangyo Kumiai Chuokaj)* faris enketon pri la kooperativaj societoj de Japanujo, kiu montras ke ekzistis en tiu lando, je la 1-a de januaro 1930, 10.188 kooperativaj konsumaj societoj, kun 3.014.992 membroj entute. La enpagitaj kapitaloj de tiuj societoj atingis 113.264.848 Jen, kaj iliaj jaraj vendoj 163.919.105 Jen entute.

Tiuj societoj pleje vendas krudmateriojn kaj laborilojn. La nutraĵoj kaj aliaj vivnecesaĵoj venas nur en dua vico, kiel oni vidas el la sekvanta tabelo :

Jara vendo de :

| | |
|---|---|
| Krudmaterioj kaj laboriloj | 92.508.065 Jen |
| Nutraĵoj kaj aliaj vivnecesaĵoj | 69.049.804 Jen |
| Aliaj produktoj | 2.361.236 Jen |
| Kune | 163.919.105 Jen |

Oni konstatis dum la lastaj jaroj grandajn progresojn en la starigo de specialaj laboristaj kooperativoj. La nombron de tiaj kooperativoj, registritaj aŭ ne, oni taksis al 130 je la fino de la jaro 1930.

L'Imprimeur-Editeur : Albert Granchamp, Annemasse. — 645-9-31.